



Numero 2

Majo 1979

Číslo 2

XX

Adresanço de la redaktoro:

Dro Josef Hradil, Tř. Rudé armády 718
29501 Mnichovo Hradiště, ČSSR

Pro transloĝiĝo de la redaktoro aperas tiu ĉi numero de VF prokraste. Ni petas pardonon de la legantaro!

Vzhledem k přestěhování redaktora vychází toto číslo opožděně. Prosíme čtenáře o prominutí!

Internacia printempa pacmarŝo en Jablonec n. Nisou. Ekmarŝis pli ol 400 partoprenantoj, esperantistoj el diversaj kluboj el Ĉeĥoslovakio, GDR kaj Pollando, turistoj, pionirgrupoj kaj kolektivoj el fabrikoj. Kelkaj el ili antaŭ la starto fiere atentigis, ke ili partoprenas jam la sepan fojon. Tio signifas, ke tiu ĉi aranĝo havas jam bonan tradicion, kiun tute eblas rompi. Ĉijara marŝo estis samtempe manifestacio okaze de la kunsido de Tutmonda packonsilantaro en Prago.
(79-04-22)

Jarní mírový pochod v Jablonci n. Nisou. Na pochod vyrazilo více než 400 účastníků, esperantistů z různých klubů v Československu, NDR a Polska, turistů, pionýrských skupin a kolektivů z továren. Někteří z nich hrdě před startem upozorňovali, že se účastní již po sedmé. To znamená, že tento podnik má již dobrou tradici, kterou zcela není možné přerušit (zlomit). Letošní pochod byl současně manifestací k zasedání Světové rady míru v Praze. (79-04-22)

LIAZ-KP-1719-Hr

Ĉiuj partoprenantoj estis kontentaj, ankaŭ la vetero favoris. Kun la plej spertaj turistoj oni tuj decidis ke venontjara aranĝo nepre enhavos ankaŭ la marŝon je distanco 35 km tra malmulte konata regiono sub la monto Jeŝtĉd.

Interesuluĵ pri partopreno de la estontjara pacmarŝo en Jablonec, petu informojn pri tranokto ktp. jam en januaro 1980 de Miloslav Jíra, 46601 Jablonec n. Nisou, Praĝská 52.

Vŝichni ŭĉastníci byli spokojeni a také poĉasí pŕálo. Spolu se zkuŝenými turisty bylo hned dohodnuto, ŝe pŕíŝtí rok bude zahrnut také pochod na vzdálenost 35 km ménĉ známou krajinou pod horou Jeŝtĉd.

Zájemci o ŭĉast na mírovĉm pochodu pŕíŝtího roku v Jablonci neĉt' vyŝádají informace o noclehu a j. již v lednu 1980 od Miloslava Jíry, 46601 Jablonec n. Nisou, Praĝská 52.

ESPERANTA OLIMPIADO:

La junulara komisiono fine de la jaro 1978 proklamis 1-an rondon de Esperanta Olimpiado 1978. Partoprenis ĝin 11 olimpiantoj. Ĉiuj plenumis postulojn kaj avancis en la superan rondon. Temas pri jenaj samideanoj:

D.Berndt (Berlino), I.Drbohlavová (Turnov), J.Duda (Olomouc), L.Filipová (Chropynĉ), J.Hrbek (Nová Ves), H.Jánová (Ĉeské Budĉjovice), E.Jelínková (Tŕebíĉ), F.Klouĉková (Mĉlník), ing. J. Mastný (Ĉeská Lípa), J.Riedl (Hradec Královĉ), J.Tomíĉek (Říkovice).

Ĉiuj partoprenantoj ricevis diplomon kaj iliaj nomoj estis enskribitaj en la kronikon de la junulara komisiono. Taskojn de la 2-a rondo ili ricevos al sia adreso, ĉar nur ili rajtas ĉi rondon partopreni. Por ceteraj interesuloj ni preparis novan 1-an rondon.

Komise mládeŝe koncem roku 1978 vyhlásila 1.kolo Esperantské Olympiády 1978. Zúĉastnilo se jedenáĉt soutĉžících. Vŝichni splnili podmínky soutĉŝe a postupují do dalŝího kola. Jsou to tito samideáni:

Vŝichni ŭĉastníci obdrŝeli diplom a jejich jmĉna byla zapsána do Kroniky komise mládeŝe. Ŭkoly druhého kola dostanou na svoje adresy, protože pouze oni mají právo tohoto kola se zúĉastnit. Pro ostatní zájemce jsme pŕipravili nové první kolo..

1-a rondo de Esperanta Olimpiado 1979.

Taskoj:

1) Elektu unu vortfaran prefikso, kreu per ĝi derivaĵojn el 10 vortradikoj kaj uzu en frazoj.

2) Skribu espartantlingve pri via la plej ŝatata libro aŭ filmo.

Skribu eble per tajpilo sur paperformaton A4 kaj ne forgesu mencii viajn adreson kaj naskiĝdaton kaj jenan deklaron: "Mi aliĝas al 1-a rondo de EO 1979 kaj deklaras je mia honoro, ke mi kopiis la taskojn de neniuj kaj de nenie, sed ke mi ellabori ilin mem, sen fremda helpo." Dato, subskribo.

La taskojn sendu kiel eble plej baldaŭ, sed maksimume ĝis fino de julio al adreso:

1. kolo Esperantské olympiády 1979. Ŭkoly:

1) Vyberte jednu slovo tvornou pŕedponu, vytvoŕte s ní odvozeniny z 10 slovních kmenŭ a ŭĵijte je ve vĉtách.

2) Napiŝte esperantsky o své nejoblíbenĉjší knize nebo filmu.

Piŝte pokud možno strojovĉ na formát papíru A4 a nezapomeŝte ŭvést svou adresu, rok narození a toto prohláŝení: „Pŕihlaŝuji se do 1.kola EO 1979 a prohlaŝuji na svou ĉest, ŝe jsem ŭkoly od nikoho a odnikud neopsal, nýbrŝ jsem je vypracoval sám bez cizí pomoci.“ Datum, podpis.

Ŭkoly pošlete co nejdŕíve, nejpозdĉji vŝak do konce ĉervence na adresu:

Miroslav Malovec, 60200 Brno, Slovákova 9.

Asocio de Sovetiaj Esperantistoj fondita!

El Moskvo venas ĝojiga sciigo pri oficiala fondo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, kiu okazis la 15-an de marto. Pri tio referas la gazeto „Moskvaj novaĵoj“ eldonita la 22-an de aprilo en ampleksa esperanta suplemento kun raporto pri la fondkunveno. Ni citas: „La partoprenintoj de la konferenco unuanime decidis konsideri la ĉefaj taskoj de la Asocio kaj de la enirantaj ĝin organizaĵoj la partoprenon, uzante Esperanton, en la formigo de la paco kaj disvolvado de la kulturaj ligoj de la sovetia popolo kun popoloj de aliaj landoj en intensoj de firma paco, sekureco kaj kunlaborado; helpadon al esperantistoj en lernado kaj profundigo de ĝia scio; edukon de la sovetiaj esperantistoj en la spirito de patriotismo kaj internaciismo, malkompromisemo koncerne la reakcian ideologion, faŝismon, koloniismon, rasan diskriminadon kaj socian maljuston.“

La citita alineo parte respondas al la demandoj pri la karaktero de la nova landa organizaĵo en Soveta Unio. La prezidanto de ASE fariĝis prof. D-ro Mahomet Isaev, dum ĝiaj vicprezidantoj estas: N. S. Zubkov, A. J. Makovskij, S. N. Podkamier kaj V. V. Samodaj. Respondeca sekretario estas A. V. Berjoza, kiu plenumis dum la lastaj jaroj similan funkcion en la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetiaj Esperantistoj.

La fondiĝo de ASE signifas oficialiĝon de la Esperanto-movado en Soveta unio. Nun la internacia movado akiras partneron por kunlaboro kun la esperantistoj de la plej vasta lando en la mondo. Jam tio estas sufiĉe kaŭzo por saluti la novan organizaĵon, kiu sendube baldaŭ viciĝos inter la plej fortajn landajn

Esperanto-organizaĵoj. (Laŭ „Esperanto“ majo, 1979).

Svaz sovětských esperantistů založen!

Z Moskvy přišla radostná zpráva o oficiálním založení Svazu Sovětských Esperantistů dne 15. března. Referuje o tom časopis „Moskevské novinky“, vydaný 22. dubna v rozsáhlé esperantské příloze se zprávou o zakládající schůzi. Citujeme: „Účastníci konference jednohlasně se rozhodli považovat za hlavní úkoly Svazu a přistoupivších organizací, účast s použitím esperanta, na upevňování míru, bezpečnosti a spolupráce; pomoc esperantistům ve výuce esperanta a prohloubení jeho znalosti; výchovu sovětských esperantistů v duchu vlastenectví a internacionalismu, nekompromisnosti vůči reakční ideologii, fašismu, kolonialismu, rasové diskriminaci a sociálnímu bezpráví a rozvinování kulturních svazků sovětského lidu a národy jiných zemí v zájmu pevného míru.“

Citovaný odstavec částečně odpovídá na otázku charakteru nové organizace v Sovětském Svazu. Předsedou ASE se stal prof. Mahomet Isaev, zatímco místopředsedy jeho jsou N.B. Zubkov, A. J. Makovskij, S. N. Podkamier a V. V. Samodaj. Odpovědným sekretářem je A. V. Berjoza, který v posledních letech plnil podobnou úlohu v Komisi pro mezinárodní vztahy sovětských esperantistů.

Založení ASE znamená úřední uznání esperantského hnutí v Sovětském Svazu. Nyní mezinárodní hnutí dostává partnera pro spolupráci s esperantisty největší země světa. Již to je dostatečným důvodem zdravici nové organizaci, která bezpochyby se brzy zařadí mezi nejsilnější zemské esperantské organizace. (podle „Esperanto“, květen, 1979)

Adreso: Asocio de Sovetiaj esperantistoj, Prosp. Kalinina 14, Moskva K-9.

LIAZ-KP-1721-Hr.

D-ro Bohuslav Sutnar: N i m f o .

Sub la maljunaj larĝbranĉaj (koŝaté) arboj kaŝiĝis kiel perlo droninta (utopená) en oceano da parkverdaĵo miniatura lageto; en ĝia mezo sur malalta roketo (skalka) staris kaj brilis per sia malluma bronza nudeco belega Nimfo.

Ŝia kreinto donacis al ŝi sveltan (štíhlou) figuron kaj ĉarman vizaĵon iom fore reveme (zasněně) rigardantan. En sia kondamno (odsouzení) al malviva statuo ŝi staris tiel jam dum multaj jaroj kaj centmiloj da homoj preterpasis ŝin. La plimultaj preterpasis ŝin indiferece kaj ne observis ŝian belecon. La malgrandanimaj (maloduší) koleris pri ŝia senĝena (bezostyšná) nudeco, iuj viroj taksis la nudan virinan korpon kun voluptema (smyslný) plaĉo, kaj nur malmultaj ĉarmigitaj, pro belega *arta verkego*.

Ĉar ŝi ne estis viva, Nimfo devis nek pensi nek senti, do ŝi ne hontis pro sia nudeco kaj ne fieris (nepyšnila se) pro sia beleco. Ŝi plenumis nur sian destinon (určení) esti ĉiam ĉarma, en ĉiu homo de la tago, en la brilo de la suno kaj ankaŭ en la lumo de elektraj lanternoj, borderitaj (lucerny roubící) la vojon longe de (podle) la lageto.

Gutoj de akvo farantaj el la fontano sidiĝis terere (něžně) sur ŝia korpon kaj kovris ĝin per etaj kristaloj brilvibrantaj en la radioj de la suno. La krepusko (sounrak) sekretigis ŝin per la vuelo (závojem) de la melankolio, mallumaj ombroj de la nokto ŝanĝis ŝin por homaj imagoj (představy) en la misteran, ĉarman estaĵon, provokantan fantazion.

Li ŝatis promeni en la parko, kaj dum *la* jaroj longaj, sola kaj kun aliaj homoj, iradis sur la vojo laŭlonge de la lageto tiemfoje, ke li eĉ ne povis nombri tion, ankaŭ se li pri tio cerbumus. Neniam li pripensis, kiam li la unuan fojon vidis Nimfon. Certe jam antaŭlonge, iam dum siaj junaj jaroj, kiam li admiris ŝin kun seksa interesejo, same kiel aliaj knaboj kaj junaj viroj, verŝajne sekrete.

Pli malfrue li alkiutimiĝis al sia neŝangiĝebla ĉeesto (přítomnost) kaj la vivo okupis lin per sia nehaltigebla rapidemo; tial ne estis kaptita lia intereso per la beleco de la statuo kaj li preteriradis Nimfon sennombrefoje kun la sama inerto kiel aliaj homoj.

Jam dum longa tempo li sentis sin nekontenta, laca de sia vivo, kies plejparto jam estis pasinta. La fatalo donacis multon al li, ĝi ankoraŭ pli multe prenis, nun ĉie ĉirkaŭ li etendiĝis (rozprostřela se) malluma malpleneco, en kiu malmergiĝadis (vynořovaly se) nur ombroj de la pasinteco kaj staturoj de karaj homoj kaj amikoj, kiuj foriris. La vivo ne plu povis doni al li ion, nek nuntempon, nek estonteco trembrilis de espero (nezářil nadějí). Li perdis senson de sia vivo kaj multfoje li suferis pro malesperigaj (zoufalý) sentoj de izoleco. Li ne sopiris pri la socio de siaj malmultnombraj konatuloj kaj klopodante forpeli malgajajn pensojn, pli plezure li vagadis sola tra la urbo.

Foje (Jednou) dum malfrua somera vespero, promenante tra la brulantaj stratoj li ekspiris pri la malvarmeta ombro de la parko. Jam longe li ne estis ĉi tie. Sencelaj paŝoj gvidis lin al la lageto kun Nimfo.

Li estis tiel okupita de siaj melankoliaj pensoj, ke li haltis antaŭ la malgranda akvonivelo, gvicita nur per sia subkonscio, kiu bone memoris liajn multajn haltigojn ĉi tie dum pasintaj jaroj.

Vesperaj ombroj longiĝis kaj la subiranta suno per siaj adiaŭaj radioj briligis la nudecon de la statuo je la ĉarma vizio. Estis kurioze, ke ĉi tia beleco kaptis atenton de neniam preterpasintaj homoj. Eĉ ne sian atenton. Nur ia mallerte (neobratná) iranta homo, kiu ne kapabli eviti lin, devigis lin levi, siajn okulojn de la tero supren. Li ekvidis la brilantan Nimfon kaj en ĉi tiu momento li eksentis ion nekompreneblan, miraklan, lia sentema spirito ekvibris de io, kion li ne konis dum longaj jaroj kaj pro kio li esperis jam eĉ ne en la profundo de sia koro.

Li staris senmove antaŭ la lageto kaj liaj larĝe malfermitaj okuloj englutis (pohlcovaly) la ĉarman figuron kaj ankaŭ klare lumigatan melankolian vizaĝon. Ĉio krom Nimfo ĉesis ekzisti. Okupita de la vizio li rigardis ŝin, ne konsciante atenton dediĉitan al li de la preterpasintaj homoj. Li rekonsciiĝis nur post tempeto, tiam kiam li fariĝis objekto de senpaciencaj homoj, tiuj kiuj devis evitadi lin. Li foriris kelkajn paŝojn kaj sidiĝis sur la benketon, ke li povu plu observi la statuon.

La suno subiris, la bronza nudeco ĉesis lumi, ĝi fariĝis malhela, pli malvarma kaj pli mistera. Li restis longe rigardanta kun entuziasmo Nimfon, ĝis estis mallumo. Li ne komprenis sian animan staton, li estis konfuzita de siaj sentoj, sed li sindone rezignis pri ili. Li estis regita per la kvietiga; li kaj feliĉiga sento, kvazaŭ li restadus proksime de la konata kaj kara persono.

Dum la sekvanta tago mirinde li sentis sin pli kvieta kaj pli kontenta ol kiam ajn longe pli frue. Rememoro pri la ĉarmo de la pasinta vespero ja kelkfoje malkuraĝe penetris en lian konscion, sed ĉiufoje en sia interno li ridetis al ĝis naiveco kaj li rapide forpelis (zahnal) ĝin.

Li ne pripensis, kial li vespere denove ekiris en la parkon, ĉi foje pli frue ol la pasintan tagon. Se li sciis, ke li estis pelita per la subkonscia sopiro ekvidi ree la sorĉitan staturon, lia racio verŝajne rifuzus ĉi tiun ideon kiel absurda.

Li haltis apud la lageto kaj subite li ekkonsciiĝis, ke li venis por vidi Nimfon. Hontante antaŭ si mem, li levis siajn okulojn al ŝi. Li *prenis* sian lokon sur la benketo ĉe la lageto kaj li ne povis venki sin, por ke li ne plezuriĝu preskaŭ senĉese per rigardo al la figuro kaj vizaĝo. Denove li sentis la saman, sed pli potenca kontentiĝon, kial dum la pasinta vespero.

Li meditis pri siaj sentoj. Li estis venkita nek la seksa ĉarmo de la bela nuda virina korpo, nek de ŝia ĉarma vizaĝo. Temis pri io tute alia. En la krepusko de la vespero la malhela figuro ŝajnis al li strangmaniere proksima, ĝia malproksimen rigardanta mieno de la vizaĝo rememorigis al li ion konatan, karan, kion li iam perdis, sed pri kio li neniam ĉesis sopiri, la virinan teneron.

Denove li venadis preskaŭ ĉiutage kaj staris, sidis aŭ promenis de la lageto. Ĉiuvespera proksimeco de Nimfo kaŭzis al li pli grandan impreson de la feliĉa kontentiĝo - pri ĝi li sopiris dum la tuta tago. Li ne sentis sin plu sola kaj malfeliĉa; li estis regata per ĝojo de la vivo kaj de la laboro. Liaj konataj homoj kaj kunlaborantoj estis surprizitaj kaj ĝojigitaj pri lia ŝanĝo, pri kies kaŭzo tamen ili ne sciis.

Pasis somero, vesperoj mallongiĝis kaj aŭtuno bunte kolorigis foliojn de la arboj. Pli malmultaj homoj venis en la parkon kaj foje vespere sidis mem dum la tempeto ĉe la lageto. Neniu estis proksime kaj li povis tial malĝenite ĝoji per la rigardo al Nimfo. Krepuskiĝis, sed malgraŭ tio li klare ekvidis, ke la statuo sian kapon al li kaj ekridetis al li. Post kelkaj momentoj la kapo repoziciigis (vrátala se na na své místo) kaj la vizaĝo rigardiĝis en sia melankolia mieno (výraz). Lia surprizo estis tiel forta, ke li dubis pri sia menso. Li pripensis la okazaĵon dum la tuta nokto kaj dum la sekvonta tago. Vespere li denove rapidis en la parkon. Estis belega aŭtuna tago kaj homoj ĝis la krepusko promenadis preter la lageto. Fine li soliĝis kun sia statuo. Ripetiĝis la sama okazaĵo, kiel dum la pasinta vespero. Nimfo denove turnis al li ŝian ĉarman vizaĝon kaj donacis sian rideton al li.

Li venadis ĉiuvespere kaj la rideto estis ĉiam pli longa kaj pli *longa*. Ankaŭ ŝia buŝo malfermiĝis kaj ŝi klopodis diri ion al li. Li estis tute venkita per potenco de la sorĉo kaj li ĉesis racie konsideri. Li enamiĝis senlime al Nimfo, li sentis sin feliĉa por konscio, ke ankaŭ ŝi amas lin. Kun sopiro li atendis la momenton, kiam la amata statuo viviĝos (oživne) kaj li povos ĉirkaŭbraki (obejmout) ŝin.

Ŝi ne povis rezisti al lia amo kaj pasia (vášnivá) sopiro. Fine, estis tiam jam preskaŭ mallume, ŝi vidigis al li (doslovně nechala ho vidět), ke li povas proksimiĝi al ŝi. Ŝi turniĝis tute al li, levis siajn brakoj, ŝia vizaĝo ridis feliĉe kaj la buŝo apenaŭ (sotva) aŭdeble vokis: „Venu al mi! Mi volas aparteni al vi!“

Per la nerezistebla sopiro pelita (hnán) li transiris la ŝtonan borderon (okraj) de la lageto kaj iris tra la akvo al la roketo, kie Nimfo kun levitaj brakoj atendis lin, kaj li brakumis (obejmul) la amatan estulon.

Li estis trovita nur matene en la akvo kun frakasita kapo sur ŝtona soklo, sur kiu staris la statuo. En sia feliĉo li eĉ ne sentis, ke li mortis.

Nimfo staris plu senmove sur sia loko: ŝi rigardis ien melankolie, kaj pri grandega amo nesciantaj flegmaj homoj iradis prete ra lageto same, kiel jam dum mutaj jaroj antaŭe.....

Jenaj geamikoj de la internacia lingvo finis la bazan kurson korespondan de Esperanto:

Hrabíková Milada,	Praha
Šilc Jiří	Jankovice
Ing. Kubeš Miroslav	České Budějovice-Suchomel
Věra Pleskotová	Heřmanův Městec
Rašková Marie	<i>Klatovy,</i>
Ceháková Jana	České Budějovice
Mojžíš Pavol	Němčičany
Matúšková Františka	Bytča
Ing. Škrobák Anton,	Plevník-Drienové

LIAZ-KP-1718-Hr.

Korčák Zdeněk	Trutnov
Stibůrek Václav	Netvořice
Mašata Antonín	Český Brod
Svatoš Jaroslav	Dol. Kralovice

Ni bonvenigas ili en nian verdan familion kaj esperas, ke praktika uzo de Internacia lingvo alportos al ili multajn belajn travivaĵojn!

Vítáme je do naší zelené rodiny a doufáme, že praktické užití mezinárodního jazyka přinese jim mnoho pěkných zážitků!

Abundo da esperantistaj tendaroj kaj renkontiĝo estas je dispono. Ni volonte sciigos al vi adresojn – jen kelkaj interesaj:

Je hojnost esperantských táborů a setkání. Rádi Vám sdělíme adresy – zde několik zajímavých:

15-a Internacia Esperantista Feriado „La ora pola aŭtuno“ 2.-15.1979 Miedzygórze, Pollando.
Detaloj: Pola Esperanto Asocio, Rondo Adam Zakrzewski, str. Dubois 3, P.O.Kesto 16, PL 50952
Wroclaw 17

Nigramara Esperanto-Feriado, 1.-15.9. Albena. D: 4700 Smoljan Bulgario, Internacia Esperanto-Kursejo.

Esperanto feriado kun ĉevaloj, Julio 15.-22. en Bydgoszcz. D: Buroo de Internacia Esp.-Interŝanĝo, M.Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz.

Julio Meztur Internacia Esperanto Laborbrigado. D: E-grupo Julio Baghy, Petöfi u.5, H-5400, Hungario.

Aŭgusto 11.-17. Slovaka Paradizo ĈSSR. Turisma Semajno-Renkontiĝo de Esperantistoj. D: E-klubo Sobotske nam. 1735, 05801 Poprad

Somera Esperanto-Universitato 8.-14.Julio 1979 Gyula, Hungario; prelegoj, koncertoj, filmprezentadoj, ekskursoj, ekspozicioj. Informoj SEU, TIT, 48-as u.11, H-5700 Gyula, Hungario
Renkontiĝo kun germanaj esperantistoj – julio 1979 – eblo de senpaga tranoktado en studenta hejmo. Inf: Inĝ. D.Liera, Str.d.Berfreitung 1-7 Weiszwasser 758-DDR.

Laborbrigado Bekescaba Hungario 11-28.VIII. Senpaga partopreno kun ekskursoj. Detala informo: Budapeŝta informilo Nro 12/78 p.17.

Lastmomente: 3-a KONGRESO de Ĉeĥa Esperanto Asocio

okazis en Prago la 10-an kaj 11-an de februaro 1979. Partoprenis (ŭĉastnilo se) la kongreson 104 delegitoj, 149 enlandaj (domácích) kaj 19 eksterlandaj gastoj kaj grupoj de junaj polaj turistoj, sume (celkem) pli ol 320 personoj. La ĉeestantoj (přítomní) aŭskultis raportojn de la asocia estraro kaj sekretario pri la agado de post la II-a kongreso en 1976, kiujn legis J.Vítek kaj Z.Křimský. Oni elektis la novan centran komision kun D-ro Jaromír Jermář kiel prezidanto, kaj aprobis (schválil) agadprogramon de ĈEA por la jaroj 1979-1981. Diskutado tuŝis (dotýkala se) ĉefe la fakajn temojn. Elektiĝis estraranoj: Inĝ.V.Kočvara, 1-a vicprezidanto, V.Podhradská 2-a vicprezidantino, Z.Křimský sekretario, E.Dadák, J.Novák (Jablonec n.N.), St.Papírník 18 komitatantoj kaj 5 membroj de la kontrolo komisiono. Laboran programon variigis kulturaj kaj amuzaj eroj, precipe la teatra grupo de E.Seemanová.

Al nova estraro ni deziras plenan sukceson de ĝia respondeca kaj malfacila laboro!

Kun ĝojo mi sciigas, ke s-ano Jiří V á v r a ,
Mladá Boleslav
estis ornamita inter la 10 plej bonaj sportistoj de
la jaro 1978 de nia distrikto!

S radostí sdělujeme, že s-ano Jiří V á v r a ,
Mladá Boleslav
byl vyznamenán mezi 10 nejlepšími sportovci
roku 1978 našeho okresu!

Korespondi deziras:

(Mallongiloj-zkratky: bk-bildkartoj; ĉl-ĉiu lando; ĉt-ĉiu temo; d-deziras; fo=fraŭlo; f-ino=fraŭlino; ft-fotografajoj; gd-gramofondiskoj; iŝ-interŝanĝas; its-interesiĝas; kol-kolektas; j-jaroj; kor-korespondi; lern-o=lernanto; lern-ino=lernantino; l-leteroj; m-muziko; pm-poŝtmarkoj; s-ro = sinjoro; s-rino=sinjorino; tm-tutmonde.)

Kursgvidanto serĉas por siaj gelernantoj (junaj kaj mezaĝaj) gekorespondantojn. Werner Haupt, Bretenlehm 24, KarlMarx-Stadt DDR 9063

E-klubo ĉe komputila laboratorio d iŝ sonbendigitajn (magnetofonajn diskutojn) P.Gardner.

I.B.M.U.K. Labs.Hursley, Hants, GB SO21 2JN.

Seleŝ Hdravko, 16j lern-o, its pri ft, literaturo kaj Seleŝ Božica 18j its pri korbopilkludo; Peŝčenica 4, YU-43350 Durdevac.

30j konstruisto, d kor pri m, lingnogravuraĵoj: Ivan Nikolov Vakinov, urbo TROJAN, str. Ivan Donĉev 2, Bulgario.

Lernejoj 14-16 j d kor: Gvidantino f-ino L.Primmer, South Graven School, Crossills, Keighley, Anglio.

Radioteknikisto Andreo Kosinski, 28j, d kor. Ul.Sienawska 1H/13, 68-200 Hary, Pollando.

Chelstowski Zdislav, ul. Platnerzy 3c/3, 73-110 Stargrad Szcz, Pollando d kor pri moderna m, sporto, kol. bk.

Studento de komerco 20j its pri reklamo, kol kalendaretojn. Dmitrij Sergejeviĉ Odincov, Littkensa 7.K.6, Jalta US 33420, Sovetunio.

Waldemar Kielca, 19j, 42-450 Lazy, ul.Brzozowa 14, Pollando d kor pri moderna m, sporto, filmoj.

Siberiaj Esp-istoj 20-45j d kor kon tm, iŝ, bk, pm kun seriozaj filatelistoj. E-klubo, *ab.jaŝ* 60, SU-652870 Mejdureĉensk-centr Kemerovskaja obl., Sovetunio.

XXXXXXXX
XXXXX
XXX
X

Esperantský kroužek

Klubu pracujících

Cs 29501 Mnichovo Hradiště

Tiskopis

Imprimé 50%

Presajo

LIAZ-KP-1723-Hr.